Año III (N.° 35)

Núm. 11

# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

NOVIEMBRE 1951

RUZAFA, 7

VALENCIA (ESPAÑA)

## ¡EL ESPERANTO ES TAN SOLO UN IDIOMA!

### PERO UN MAGNIFICO IDIOMA AUXILIAR, NEUTRAL, EXPRESIVO Y FACIL

Por eso mismo, cuando alguna sombra de malicia o de ignorancia pretende hurtarle reflejos a la esmeralda de nuestras alegres esperanzas, no es posible ocultar la extrañeza de que hayan personas todavía sin saber que un idioma no es otra cosa que... un idioma: es decir, un medio de mayor o menor calidad literaria, con más o menos acervo espiritual, según su tradición y su influencia en la historia, pero siempre un recurso que los hombres emplean para cambiar entre si ideas y pensamientos. Así, pues, un idioma puede ser privativo de una región, de una nación, de un estado, aunque no siempre, pero nunca —¡jamás!— de una tendencia ni de una creencia determinada (Extracto del editorial en el BOLETIN n.° 10 correspondiente a Octubre 1949)

## CUESTION DE ALTURA

**En cierta ocasión. un periodista que deseaba pasar por agudo, definió al Esperanto como «un latín para ir en el tranvía». Con ello, el humorista quiso categorizar a la lengua universal como instrumento solo utilizable por gentes de poca cultura o para menesteres cotidianos o de bajos vuelos. Sin querer, y sin saber, el gacetillero hizo del Esperanto la mejor apología que pudiera desearse. En efecto, el tranvía, la «carozza di tutti», es el exponente más representativo de la vida ciudadana; el instrumento de primera necesidad para todos, que, desde las primeras horas del alba hasta los últimos estertores del día, es la palestra en que discurren, bajo el signo del trabajo, el deber o el asueto, los tipos más dispares de la colmena humana. A él se sube sin afán de distinción, por poco dinero, y con utilidad tangible.**

**El idioma auxiliar creado por Zamenhof es, también, un instrumento de utilidad rápidamente adquirida, tras mínimo esfuerzo, y sin más pretensión que la seguridad de poder alcanzar, por medio de él, la comprensión que, raras veces, puede lograrse con otros idiomas a costa de penosos y largos esfuerzos. Si un idioma no sirviese más que para entenderse en el tranvía con gentes de todas las procedencias, ya sería una ejecutoria de suficiencia. Y no olvidemos que ni aun aquellos que han estudiado latín (el verdadero, el de Virgilio y Horacio), se verían muy apurados para entenderse con dicho idioma, para resolver todas las cuestiones que pueden debatirse en un tranvía: desde la petición del billete, la protesta por el empujón, la cortés solicitud de paso, por el estrecho corredor, o la conversación con el amigo.**

**Y ese es el más sobresaliente de los méritos del Esperanto. Que por poco esfuerzo sirve para que, aun los menos aptos, sean capaces de habérselas con gentes de otros países, para sostener conversaciones acerca de los temas de la vida corriente. Que sin darse importancia de sabihondo, un ciudadano sencillamente dotado pueda, durante horas y horas, considerarse no extraño de otro con quien puede entenderse, sin penosos sudores, ni balbuceos ridículos e inexpresivos. Esto en los tiempos que corremos, ya es mucho, pues esto es sencillamente ser «práctico». Que es, precisamente lo que no son los demás idiomas que pudieran proponerse para desplazarlo: desde el latín hasta el «Basic English», que es, como si dijésemos, una modificación del Inglés que tiene todos sus inconvenientes, aunque compendiados, y ninguna de sus ventajas. Además el Esperanto no se contenta con ser el «latín para el tranvía», sino que es el idioma idóneo para las altas esferas del pensamiento y la poesía. Y no admite comparación con otros idiomas para las más excelsas formas de la retórica, ni para las más sutiles disquisiciones metafísicas. Lo cual equivale a decir que es el latín para «volar en Clipper!» Alto, y bien alto, vuela el idioma de Zamenhof, libre del lastre de las irregularidades y exento de convencionalismos exasperantes y, sin embargo, insustituible y admirable por su encantadora sencillez. Los esperantistas aceptan, pues, como alabanza, la tranviaria comparación, que quiso ser un denuesto... y equivocó el camino!**

# POPOLA JAPANA FABELO

«Hanasaka-ĵiĵi» (Spirito de Printempo) estas popola fabelo ankoraŭ rakontata ĉie en Japanio

*Ni aperigas la fabelon, kiun japana samideano Takao Jamada rakontas per la simpla kaj bela stilo, kiun japanoj scias doni al Esperanto. Similajn fabelojn aŭ legendojn de aliaj landoj ni volonte akceptos.*

Antaŭ multege da jaroj vivis du maljunuloj; unu estis bona, kaj la alia estis malbona. La bona maljunulo havis hundon, kiun li tre amis; la hundo estis tre fidela kaj sekvis sian sinjoron ĉien, kien li iris. Iun tagon, li prenis la hundon kun si al kampo; la hundon subite komencis boji ĉe unu angulo de la kampo; tio estis al li, kiel se hundo dirus: «Fosu ĉi tie! Fosu ĉi tie!» La bona maljunulo fosis, kvazaŭ sekvante la indikojn de sia hundo, kaj li estis mirigata, ĉar li trovis multajn pecojn de oro, arĝento kaj altvaloraj gemoj.

La malbona maljunulo, kiu loĝis najbare, aŭdis onidiron, kaj prunteprenis la hundon; kvankam li tiris ĝin al la loko, kie la bona maljunulo fosis, la hundo neniom bojis, tial li batis la hundon ĝis, fine, ĝi komencis fosi la lokon bojante, kvazaŭ dirante: «Fosu ĉi tie! Fosu ĉi tie!» Kiam li finis fosi, malgraŭ lia granda peno, li nenion trovis krom disrompaĵojn de porcelano kaj ŝlima akvo. La maljunulo tre ekkoleris kontraŭ la hundo kaj mortigis ĝin. La bona maljunulo kompatis ĝin pro la morto; li enterigis sian hundon, kaj tie li plantis junan pinarbon. Baldaŭ la arbo kreskis kaj altiĝis, kiel granda arbo; la bona maljunulo hakfaligis ĝin kaj faris lignan pistujon. Kiam li komencis pisti boligitajn gluecajn rizojn en la pistujo, la rizoj ŝanĝiĝis je oro, arĝento kaj altvaloraj gemoj.

La malbona maljunulo denove venis por pruntepreni la pistujon; tuj kiam li pistis la rizojn, ili ĉiuj fariĝis malpuraĵoj; do, li denove tre ekkoleris kaj dishakis la pistujon en pecojn. Post tio, li ĵetis ilin en fajron. La bona maljunulo kompatinte petis la malbonan, ke li donu la cindrojn por li. Nu, la bona maljunulo alportis la cindrojn al sia hejmo, kaj gardis ilin en angulo de la korto; iun tagon, blovo de ventego disŝutis la cindrojn sur velkintajn arbojn, kaj subite la arboj fariĝis plenfloraj. Li vidis tion kaj tre ĝojis; li enigis la cindrojn en grandan korbon; kaj li iris tra la vilaĝo kun la korbo da cindroj, vokante: «Mi estas la Spirito de Printempo. Mi povas florigi belajn florojn al velkintaj arboj!». La feŭdestro de la distrikto hazarde preterpasis tie kaj diris: «Tio estas tre interesa al mi. Provu tion, se vi povas!»

La bona maljunulo disŝutis kelkajn cindrojn sur velkintajn arbojn, kaj ili disfloris plej belege. La feŭdestro admiris kaj laŭdis lin treege; dirante, ke ĝi estas miraklo. La feŭdestro ripetis la vorton: «Mirinda!»; kaj li plu ripetadis ĝin. Pro tio, li donis multajn bonegajn rekompencojn al la bona maljunulo. La malbona maljunulo aŭdis pri tio kaj enviis lian najbaron; li volis esti rekompencata per sama rimedo; li kolektis ĉiujn cindrojn restigitajn kaj enigis ilin en grandan tinon. Tiam, ĉi tiu avara maljunulo eliris por atendi revenon de la feŭdestro. Baldaŭ la grandsinjoro aperis antaŭ la maljunulo. Li vidis la alian maljunulon kaj diris: «Ĉu vi ankaŭ estas la Spirito de Printempo? Se vi estas, igu plenfloradi velkintajn arbojn denove!» La najbara malbona maljunulo disŝutis la cindrojn sur branĉojn de velkintaj arboj, sed floroj neniel ekfloris; inverse, la feŭdestro kaj liaj akompanantoj estis surŝutataj de cindroj; iliaj okuloj, naztruoj, oreloj kaj buŝoj estis plenigataj de la cindroj.

La feŭdestro indignis kaj diris: «Arestu lin! Li estas trompisto! La avara malbona maljunulo estis arestata kaj enkarcerigata.

**TAKAO JAMADA - NIŜINOMIJA-ŜI (Japanio)**

## INTERNACIA LINGVO SERĈATA POR AVIADO

Dum la lasta tempo, ICAO (Internacia Civila Aviada Organizo) multe diskutis la problemojn de lingvo en la aertrafiko, precipe konsiderante la problemojn, kiuj evidentiĝis en la uzo de la angla lingvo, kiel la oficiala internacia lingvo por la aviado.

En konferenco de la Komunikada Sekcio de ICAO, en Montreal, (Kanado) 24. Aprilo - 2. Junio 1951. oni rekomendis al ĉiu ŝtato reprezentata en ICAO, ke oni starigu esploradon pri la redaktado de aviada internacia lingvo, surbaze de la angla. Laŭ tiu rekomendo, oni celas aliformigon de la angla lingvo kun laŭebla enmikso de latindevenaj vortoj kaj elbaro de anglaj vortoj, kiuj estas malfacile prononceblaj por ne-angloj. Unuavide, tio ŝajnas esti vana klopodo naski hibridan lingvon, sed oni jam spertis kiom da fantazio povas okazi sur la lingva kampo, malgraŭ la fakto ke jam ekzistas multjare pruvita solvo en Esperanto.

Aparte grava por ni estas la jena diro de ĝia raporto (DOC. 7171-COM/544):

> «...La Sekcio konsideris, ke la kreo de tute artefarita lingvo estas projekto tro akademia kaj verŝajne ne atingus bonajn rezultojn aŭ la necesan kunlaboron en plenumiĝo, kiu estas esenca por la sukceso de tia klopodo» (p. 288)

El tio estas tute evidente, ke la Sekcio aŭ tute ignoris aŭ ne konscias pri la atingoj de Esperanto. Estas tre dezirinde, ke ĉiu esperantisto skribu al la Sekretario de Sekcio ILA, ICAO, Montreal (Kanado), atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.



# AL HABLA CON EL JEFE DE LA ORGANIZACION NACIONAL DE CIEGOS

*D. José Ezquerra, relevante personalidad entre los ciegos españoles y prestigioso Jefe de la Organización Nacional de Ciegos, es un entusiasta y activo esperantista. En Madrid goza de generales simpatías y, por eso mismo al contar entre nosotros a tan distinguido samideano, la Sección de nuestra Federación en la capital de España se ve honrada y sumamente favorecida. Conocedores de que el Sr. Ezquerra asistió al 21 Congreso Internacional de Ciegos Esperantistas, celebrado el verano último en Múnich, nos hemos puesto al habla con él, para que nos contestara a unas cuantas preguntas, que siendo de interés general serán también del agrado de todos nuestros lectores.*

**¿Qué motivos le indujeron a Vd. a tomar parte en este Congreso Internacional?**

El único motivo que me indujo a tomar parte en el 21 Congreso Esperantista de Ciegos fué la amable invitación que me hizo el Presidente de la Comisión Organizadora, Sr. Kreitz, el cual, sin duda, se acordó de mí porque soy antiguo esperantista, pues lo aprendí el año 1907, estando abonado a la revista «Esperanta Ligilo». En 1932 publiqué un artículo en la mencionada revista que fué premiado en el concurso, que se celebraba cada mes, entre los artículos que figuraban en la publicación También, en estos últimos tiempos, se ha hablado bastante de nuestra gran Obra nacional y de su actual Jefe, en dicha revista y, sobre todo, porque mandé imprimir en Braille una Gramática y Diccionario de Esperanto, con gran contento y alegría de muchos ciegos españoles e hispanoamericanos, los cuales disponen, desde ahora. de todo lo necesario para poder aprender cómoddmente el Esperanto.

**¿Qué impresión le ha producido su participación en el Congreso y de su convivencia con los compañeros de los distintos países?**

Magnífica; a los ciegos nos une ya, por encima de toda opinión política o social, un profundo sentimiento de solidaridad que tiene su fundamento en el hecho de estar afectados todos por las mismas limitaciones en el desenvolvimiento de nuestras facultades físicas, intelectuales y morales, luchando todos a una por un ideal común, por un ideal de superación en el orden físico, intelectual y moral para suplir, en parte, con nuestro esfuerzo, la carencia de la vista y convertirnos en valores positivos, dentro de las actividades nacionales. Más, si a todo esto se agrega el hecho de hablar todos una misma lengua, nuestra corta convivencia con ciegos de distintos países ha de resultar sumamente útil, agradable y alentadora para todos.

**¿Qué problemas de tipo social, económico o educativo se han tratado en este Congreso Internacional a que nos referimos?**

En el Congreso de Ciegos Esperantistas no se discuten, precisamente, problemas de carácter social, económico o educativo de los ciegos, porque éstos son ampliamente tratados por las Organizaciones nacionales de cada país, según sus peculiares características y necesidades. Lo que sí se hace es leer los informes que algunos congresistas traen a las sesiones, para dar a conocer las condiciones de vida de los ciegos, en sus respectivos países. Por mi parte, también yo llevé un extenso informe sobre nuestra gran Obra nacional, llamando poderosamente la atención la manera cómo ha resuelto España el problema de la ceguera en su triple aspecto; educativo, social y económico. El Congreso de Ciegos Esperantistas se ocupa. principalmente, de la propagación del Esperanto entre los Ciegos del mundo entero, a fin de que por medio de aquél resulte más eficiente la estrecha solidaridad que entre ellos existe.

**¿Y, en relación con el Esperanto, cuáles fueron los temas más importantes?**

Los temas más importantes que se trataron en el Congreso fueron, entre otros, la creación de la Federación internacional de Ciegos Esperantistas y el establecimiento de una Biblioteca internacional de obras en Esperanto, impresas en Braille, reuniendo en dicha Biblioteca todo lo impreso en el idioma auxiliar internacional en los distintos países del mundo.

**¿Tiene Vd., por último, algo más que decir?**

Sí, debo expresar aquí mi gratitud al Presidente del Congreso, Sr. Kreitz, quien propuso, a la Asamblea del mismo el nombramiento de Presidente y Vicepresidente de honor al Dr. Musella y a mí. También me fué ofrecido el cargo de Presidente de la Federación Internacional, cargo que resigné por las muchas ocupaciones que lleva consigo la Jefatura de nuestra Obra nacional, aceptando, no obstante, un puesto de Consejero en la Junta Rectora.

## GALANTA HEZITEMO

Iun matenon, juna kaj bela virino iris piede al aŭtobuso tra kelkaj stratoj, preskaŭ senhomaj. Subite, ŝi ekaŭdis virajn paŝojn malantaŭ si. Ŝi ne volis sin turni por vidi, kiu ŝin sekvas. Tamen, ŝi rapidigis siajn paŝojn, kvankam la postirantaj ankaŭ pliviglîĝis. Alveninte en centran parton de la urbo, ŝi paŝis pli malrapide, kion ankaŭ faris la mistera persekutanto.

Ĉe la aŭtobusa haltejo, la timiĝinta belulino decideme rigardis vizaĝe la obstinan sekvanton. Ho, kia surprizo! Mire, ŝi vidis, ke temas pri ŝia najbaro S-ro Klem, la advokato, plej bone edukata kaj ĝentila persono. Kontente ŝi ekkriis:

—Ho, sinjoro, mi spertis grandan timon. Kial vi ne alparolis aŭ atingis min?

La advokato deprenis sian ĉapelon, faris korteganan riverencon kaj afable diris:

—Pardonu min, ĉarma sinjorino; sed dum la daŭro de mia sekvado, forte mi hezitis, ne sciante: ĉu agrabligi miajn orelojn, aŭskultante vian voĉon, aŭ ĝojigi miajn okulojn, rigardante vian dorson!

**EMILIO PRADES**

## ORDINARA HISTORIO

Li ekflirtis. Ŝi respondis; ambaŭ enamiĝis,
Geedziĝis kaj... ĝis morto ili malpaciĝis.
Sed la tomba nekrologo poezie bruas:
«Tie ĉi mildaj geedzoj paceternon ĝuas!»

**A. KOM (El Helena Esperantisto)**

## DEMANDO KAJ RESPONDO

Al saĝa homo foje oni demandis, kiu el tiuj tri faktoroj: Laboro, Prudento kaj Mono estas plej taŭga por trafi sukcesojn en la vivo. Al tio la saĝulo respondis:

—Ĉu oni povas diri, kia rado estas plej grava aŭ plej necesa en triciklo?

---

Tuj, antaŭ ŝia edziniĝo, oni tre abunde laŭdis la bonajn kvalitojn de la fianĉino:

—Ŝi estas tre ĉarma —diris unu.

—Kaj tre inteligenta —asertis alia.

—Kaj tre laborema —emfazis cetera.

—Eĉ tute diskreta —konfirmis plia.

La fianĉino, aŭdinte okaze tiajn laŭdojn, ne povis elteni sian kontenton kaj ekdiris:

—Ho, kiel multe feliĉa kaj ĝoja mi estus, se mi povus esti mia edzo!...

## PATRA AMO

Mi estas patro de eta fileto,
kiu ŝajnas al mi: la gloro, la ĉielo,
la cel' de mia viv', la polusa stelo
kaj de mia edzin' la vera portreto!

Mia etulo jam ĝojas ludante kun mi;
li ĉiam ridetas, li ĉiam petolas,
kaj liaj braketoj, tuj kiam li volas,
mian kolon ĉirkaŭas kun buba graci'

Kresku, filet' mia, ĝis bona statur',
sed kresku, senĉese, en prudent' kaj saĝo,
ĉar mi helpos vin, tutkore, kun plaĉo,
kiel estas mia devo kaj mia plezur'.

**J. DEVIS (Valencio)**

> NE MALPLI VIVAS TIU, KIU VIVAS PLEJ RAPIDE; NEK ESTAS MALPLI VARIA LA VIVO PLEJ MONOTONA.
>
> *Stefan Sweig*

## LUDANTE ONI LERNAS
### (SFINKSA ANGULETO)

### ENIGMA KADRO

| | | | |
|---|---|---|---|
| ✻ | ✻ | ✻ | ✻ |
| ✻ | ✻ | ✻ | ✻ |
| ✻ | ✻ | ✻ | ✻ |
| ✻ | ✻ | ✻ | ✻ |

*Anstataŭigu la signetojn per literoj laŭ maniero, ke oni povu legi tute same* **horizontale** *kaj* **vertikale:**

1—Vorto por distingi homojn aŭ objektojn.
2—Antikva greka monero (radiko).
3—Stampita metalo aŭ papero.
4—Bela kataluna urbeto en Pirineo.

### MISTERA KOLONETO

*Metu, unu sub alia, OK kvinliterajn vortojn, kiuj siavice devas havi jenajn signifojn:*

1—Meti objekton sur alia por kaŝi.
2—Vere ekzistanta kaj efektiva.
3—Kalcio-oksido.
4—Voĉo de bestoj.
5 -Rabobesto el la familio de katoj.
6—Arbo el la grupo de koniferoj.
7—Patrino de patro aŭ patrino.
8—Eligi larmojn.

*La mezaj literoj devas formi vertikale la nomon de grava hispana kaj bela urbo apud la Mediteraneo.*

**AMALIA NUÑEZ DUBUS (Pamplono)**

Ĝusta solvo de ambaŭ enigmoj ricevos donacon. Sendu la solvojn al la redakcio, kiu akceptos ilin ĝis la 22.a de Decembro.

***(Por kontrolo, en venonta numero aperos la solvoj)***

# ESPERANTO EN LA PRAKTIKA VIVO

de Hristo D. Zlatarev
HEDEZE, Ĉirpau (Bulgario)

*Kvankam ne facile realigebla la propono, kaj tro facile optimista la konkludo, ni trovas tamen interesa kaj vere studinda la artikolon de S-ro Hristo D. Zlatarev, kiun sendis al ni lia hispana korespondanto*

Ne malofte, scivolemaj homoj, vidante sur nia brusto la verdan steleton, nin demandas pri la prefero de nia ŝatata Esperanto antaŭ la ceteraj naciaj lingvoj. Ni tuj komencas pledi impetege, ke Esperanto estas facile ellernebla, ke ĝi nin konatigas kaj nin ligas kun la tuta mondo, kvazaŭ ĝi estus fenestro tra kiu oni vidas la mirindaĵojn tutmondajn, la kunhomojn diverskolorajn. Por pruvi nian diron, ni eĉ elpoŝigas nian korespondaĵon internacian kaj komencas fanfaroni, montrante al nia interparolanto leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn, fotojn de amikoj malproksimaj, markojn interesajn de nekonataj landoj. Ni parolas pri nia esperanta literaturo, pri niaj revuoj kaj gazetoj, pri nia tradukita el multaj lingvoj kaj originale verkita literaturo. Tamen, kiel respondi al malfacila kaj malagrabla demando pri la praktika, scienca esperanta literaturo? En la vivo ne sufiĉas la plezuro de la beletro. Oni bezonas ĉiuflankan konon de la naturo, science rigardi al la mondo. Mi ripetas la demandon: Kia esperanta literaturo nun troviĝas sur la sekvantaj branĉoj de la scienco: tekniko, ĥemio, medicino, geografio kaj aliaj? Kortuŝa estas la respondo: PRESKAŬ NENIA! Tre malbona sorto do por nia amata Esperanto! Nekomprenita nia alta ideo por interfratiĝo de ĉiuj nacioj! Multe oni elspezas por plezuro, por armiloj al neniu necesaj, sed por Esperanto mankas mono; ĝi mankas por presi librojn utilajn al la tutmonda esperantistaro.

Ni bezonas sciencajn librojn, kaj ilin ni devas havi! Nia devo estas nur labori por **la tago de venkinta Esperanto**. Ni devas serĉi niajn bonfarantojn! Ni devas malfermi larĝe niajn monujojn por la sukceso de nia movado! Por ke la moderna homo interesiĝu, rilate al nia lingvo kaj nia movado, ni devas havi riĉan literaturon, precipe praktikan. Tial, cele al tiu strebado, oni devas senprokraste decidi presi kaj eldoni en Esperanto sekvantajn gravajn librojn:

1. Plena Geografio, por ĉiuj landoj, kun ĉiuj necesaj klarigoj, kvankam koncize.
2. Plena geografia atlaso, kun desegnaĵoj de ĉiuj landoj de la Mondo.
3. Plena geografia libro pri la loĝatejoj, riveroj, montoj k. a. de la tuta Mondo.
4. Plena kolekto da biografioj de la plej grandaj homoj de la Scienco.
5. Ilustrita Mineralogio (Kun mallongaj klarigoj).
6. Ilustrita Albumo, kun reproduktitaj bildoj de skulptaĵoj de eminentuloj.
7. Ilustrita Albumo, kun reproduktitaj bildoj de plej gravaj pentraĵoj.
8. Ilustrita Albumo de ĉiuj bestoj.
9. Ilustrita Albumo de ĉiuj kreskaĵoj.
10. Praktika industria teknika Teknologio.
11. Praktika industria ĥemia Teknologio.
12. Plena kaj detala Ĥemio (Kun desegnaĵoj).
13. Plena kaj detala Fiziko (Kun desegnaĵoj).
14. Teknikaj receptoj.
15. Medicinaj formuloj.
16. Ilustrita Albumo (perioda mondrevuo).
17. Ilustrita Albumo, por infanoj.
18. Ilustrita kolekto pri nacikudrado kaj kostumoj el la tuta Mondo.
19. Praktika Konsilanto, aŭ hejma agendo por la ordinara vivo.

Kaj ankoraŭ aliaj albumoj, gvidiloj, k.t.p.

Tiamaniere, la malriĉaj malgrandaj popoloj povos ankaŭ ĉerpi el la internacia fonto de la tutmonda kulturo. Komprenéble, la literaturo menciita, plialtigos la intereson al nia lingvo kaj plinombrigos ĝiajn adeptojn. Finfine, la idealo de ĉiu esperantisto realiĝos: la belaj kaj riĉaj naciaj lingvoj cedos sian lokon al nia belsona, facile ellernebla internacia lingvo. La scienco internacia fariĝos propraĵo de ĉiuj popoloj, La lingvaj muroj, inter la popoloj, tute disfalos; kaj la homaro fariĝos kvazaŭ unu granda familio. La militoj jam ĉesos. La paco ekregos tra la tuta mondo. Firme kaj kuraĝe ekpaŝos la homo al sia nova feliĉega tago. Kaj la verda stelo hele brilos sur la homa vojo, montrante al ĉiuj novajn tre lumajn horizontojn!...

**PRO TIO, KE ESPERANTO ANKORAŬ SITUAS NUN EN STATO DE IDEALO**
**NIA DAŬRA OFEREMO KAJ NIA OBSTINA PERSISTO LUDAS DECIDAN ROLON!**

Desegnante subtilajn zigzagojn, sur nebula fono el pufitaj nubegoj, la ventoj aŭtunaj forblovas la verdajn lamenojn de lastaj folioj, kiuj, ankoraŭ ĝis antaŭ ne multe, tegis kun susuroj kupolojn kaj halojn vere fantaziajn en la impona palaco, kiun la arkitekturo de arboj formis ja kaj formas per moviĝemaj variaj reflektoj de fibroj tremantaj el vegetaj smeraldoj. Ne plu la suno petolas nun, per varmaj grimacoj, tra la diafanaj tegmentoj aŭ larĝaj vitraloj el densa velura foliaro, ĉar baldaŭ —tre baldaŭ!— tie restos nur la konciza resumo de plej sekaj brançoj, kiel nudaj ĉevronoj aŭ traboj senvivaj, preter la stranga strukturo de fora pejzaĝo en konstruo...

Aŭtuno estas melankolia nostalgio por la tempo, kiu per veanta ventego, atendante la vintron, sopiras al la ebria apoteozo de somero kaj printempo; same kiel homoj avidas, ĉe limo de la meza aĝo, eltrinki rapide la restintajn gutojn, kiuj logas kaj tentas ankoraŭ, en la fundo de pokalo, kiel kara nektaro, en la efemera festeno de la vivo. Tamen, ho, saĝa homo ja scias ordigi prudente siajn proprajn plezurojn, adaptante ilin al la ebloj de sia povo, aŭ al la postuloj de sia devo, kies akurata plenumo liveras tre ofte plej intiman ĝuon, ekster la kapricoj aŭ ŝanĝemaj influoj de la meteorologio. Tial, do, flegme rigardante en aero la striojn de falantaj folioj, mi akrigas krajonon, pretigas paperon kaj rakontas al vi pri la enhavo kaj aspekto de niaj gazetoj: tiuj vivaj folioj, kiuj, aroge defiante la krizon kaj moralan froston, tute neniel velkas dum aŭtuno.

Antaŭ ol migri kaj vagi tra Eŭropo, daŭrigante la finon de mia pasinta kroniko, jen mi komencas nun la revuon: BRAZILA ESPERANTISTO estas flago kuraĝa de la plej forta amerika bastiono, laŭ tiaj vivosignoj, kiaj montriĝas jam en Meksikio tute najbare de Usono, kies disvolviĝanta tekniko ebligas ŝancon por grandskalaj metodoj. AMERIKA ESPERANTISTO raportas detale pri la 41ª Kongreso de E. A. N. A. Nur bedaŭre, ke tiel bele prezentita kajero ne estas pli dika, pli impona, kiel decas al la balteo por la stelplena standardo. Kaj nun, mi eniras en la eŭropan mozaikon, tra la pordo de la Balkanoj.

# Proverbo diras: Volo estas povo!

# INTER LA PROZO DE LA

LA SUDA STELO, organo de Jugoslavia Federacio, en formo de plaĉa preskaŭ luksa revuo, kun ilustrita kovrilo kaj ege interesa filatela paĝo, dediĉas ampleksan spacon al sia 15ª nacia Kongreso, sukcese okazinta en Ljubljana, kun ĉeesto de ministro kaj ekterlandaj gravuloj: pastro Andreo Cseh, nome de Internacia Esperanto-Instituto, kaj S-ro Einar Adamson, kiel delegito de ĉiuj svedaj asocioj. Aparte interesaj kaj vere ĝuindaj estas la literaturaj kaj poeziaj pecoj, kiuj ĉarme kompletigas la aranĝon de tiu tiel bona gazeto, pri kiu ni gratulas la tieajn amikojn. ESPERANTISTA estas la titolo de la revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakio; kun sobra stilo kaj masivaj konceptoj, oni pledas por nia afero, donante preferon al detalaj informoj, pri enlanda kroniko, kaj al ampleksaj, treege bonaj, lingvaj aŭ gramatikaj klarigoj. Elkore mi dankas la afablajn vortojn, kiujn al mi mem kaj al mia rubriko oni diras en unu el la numeroj. LA MIGRANTO, kiel plaĉa ligilo de esperantistaj naturamikoj, estas nova kaj optimista kolego, kiu deziras veki en nia movado emojn kaj inklinojn por la naturo; jen celo, do, tute laŭdinda, ĉar sana kaj bela kaj arta kaj distra ĝi estas. En mia arbara dometo, ĉi tiu gazeto estas kvazaŭ komplemento! la senlaca sindonemo de amikino Robineaŭ intervenas en la entrepreno. SVISA ESPERO, per

## ALPROKSIMIĜAS L

Tago ĝi estas neniel ordinara por ĉiu konscia
Zamenhof-tago, kiun ni devas celebri kaj fest
la kutimo, en tiu dato, aranĝi komunajn vesp
sidas ĉirkaŭ sama tablo, kiu akiras pro tio ra
atmosfero. Nu, en ĉiu hispana urbo aŭ vila
dato, kiu signas per trajto konkreta la naskiĝ
memorigata, ne nur ja intime kaj private, se
naj rimedoj: prelegoj en societoj aŭ kulturaj
gazetoj, starigo de Zamenhof-anguloj en salo
troj ĉe butikoj, precipe ĉe librovendejoj, ĉar
tago de la Esperanto-libro, en kiu decas aĉeti
simplan broŝuron, sed nepre aĉeti, nep
esperantistoj tute ne forgesas, en la
tago, kiam, antaŭ 92 jaroj, venis

# A ESPERANTISTA GAZETARO

sia bela bildo sur kovrilo, aspektas kiel aŭtentika montara gvidisto, por la tutmonda samideanaro, tra oportunaj vojetoj apud timegindaj abismoj ĉe la Alpoj, kie ankaŭ la verda stelo aktive dejoras. Tuj, post la eniro en Germanio, tute ne eblas ignori du ĉarmajn kaj sane kreskantajn ĝemelojn: Ĉu ne jam sufiĉe konataj? Jes, tre multe! ESPERANTO-KURIER mano ĉe mano kun sia frato ESPERANTO-POST estas paro da belaj paĝioj en la germana kortego de la esperantismo. En ĉiu numero, ili trovas la manieron garni sin per pli kaj pli altkvalitaj tekstoj kaj bildoj. Antaŭen, do, estimataj kolegoj! Apud ili, LA PONTO, oficiala revuo de la germana asocio, plenumas specifan rolon de centra oficejo aŭ de organizanta cerbo; pri tiu grava tasko ĝi respondecas kaj zorgas kun evidenta kompetenteco, kiel atestas pluraj miloj da aliĝintaj membroj. El ĝia plej freŝa frontartikolo mi ĉerpas: «Ni devas senlace marteli sur la moliĝanta fero, dum ĝi estas ankoraŭ varma. Lerteco, prudento, persisto kaj takto bridu en la varbado nian fajron. Ni gajnis multe da novaj amikoj. Ni klopodu, ke ili fariĝu perfektaj esperantistoj kaj fidelaj samideanoj!» LA ĜUSTA VOJO nelacigebla cirkulero por katolikaj esperantistoj, aperas nun klare presita, per grandaj facile legeblaj literoj, kio certe utilos por kreskigi la nombron de ĝiaj legantoj. Mi reciprokas la afablajn vortojn, kiujn ĝi dediĉas al nia gazeto! Jen, denove inter ni, la vigle avangarda EŬROPANO monata bulteno por politiko kaj kulturo. Mi vidas en ĝi la meriton, tuŝi kaj trakti plej tiklajn aktualajn politikajn temojn, en defendo de la tiel nomata okcidenta civilizo, laŭ maniero tre objektiva, sincera kaj serioza, sen malatento al la esperantistaj temoj, kio vere duobligas ĝian valoron. ESPERO KATOLIKA estas ĉiam atendata kun streĉa intereso. Ĝia enhavo estas agrabla kombino de temoj kaj problemoj, kun oportunaj konsideroj el solida katolika vidpunkto, sen neglekto al la ĝeneralaj demandoj. La ekzisto de tiel multe estimata kolego estas plej utila, kaj ĉiutage plej necesa, en la koncerto de la universala esperantismo. Daŭrigante la «migradon», mi iras nun survoje al la nordaj landoj. Tie, speciale mi volas saluti novan kolegon, kiu jam ĉe la ekapero eligas proprajn brilojn kaj rebrilojn; ĝi estas LA STUDENTO, sub eldono de Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejanoj kaj Studenta Esperanto-Klubo el Kopenhago; jen ĝiaj karakterizaj trajtoj: interesa kaj utila enhavo, bona preso, bona papero kaj bela, kvankam simpla, prezento. En la dua numero, kiun plezure ĵus mi foliumis, troviĝas grava artikolo, aparte interesa, sub titolo: «La Esperanto-movado kaj la indonezi-lingva eksperimento». Ceteraj studoj kaj fakaj informoj kompletigas la kajeron, kiun sincere mi bonvenigas, kiel amikon. Nun, jam en brita teritorio, decas aludi al THE BRITISH ESPERANTIST, tre kara kaj respektinda mentoro, ne nur por la britaj samideanoj, sed ankaŭ por ĉiuj, kiuj ŝatas flegi plej kaŝitajn nuancojn de nia internacia lingvo. En la numero, kiun nun mi rigardas, oni bedaŭre parolas pri la bezono maldungi S-ron M. C. Butler, pro financa krizo, —timiga fantomo!— Sed tiu drasta decido ne signifas tutan forigon, ĉar oni aljuĝis al li duonsalajran pension, por ke tiu kompetenta 67-jara fervorulo povu labori, kiel honora oficisto, en la klera modela asocio de la brita esperantistaro.

Estu li ekzemplo, do, por ĉi tiu aŭtuna apologio, kiun en krepusko, rigardante fali foliojn, verkis **LA LEGEMA KOBOLDETO**

## ...A 15^A^ DE DECEMBRO!

...a esperantisto; ĉar, kiel sciate, ĝi estas la granda ...sti laŭ digna maniero. Jam preskaŭ tradicio estas ...spermanĝojn, kie la membroj de grupoj aŭ rondoj ...angon de familia tablo, en mezo de vere hejmeca ...aĝo, kie loĝas pluraj samideanoj, tiu memorinda ...iĝon de la genia kreinto de nia lingvo, estu nunjare ...ed ankaŭ publike —se eble— per diversaj oportu... institucioj, artikoloj aŭ biografioj en ĵurnaloj kaj ...lonoj aŭ ĉambroj, alegoria ornamo de montrofenes... oni zorge atentu, ke la Zamenhof-tago ankaŭ estas ...ti, la eblo de la monujo, jen dikan volumon, jen ...pre konveni por nepre atesti, ke la hispanaj ...la kalendaro, la datrevenon de tiu elstara ...en la mondon la aŭtoro de Esperanto

**Ĉar.. ofte povo enuas tute sen volo!**

# HISPANA KRONIKO

## EKSTERLANDAJ GESAMIDEANOJ VENAS, PRELEGAS KAJ HALTAS EN VALENCIO

La 14-an de pasinta Oktobro alvenis en nia urbo S-ino Patricia de Cleene, fervora kaj afabla samideanino el Novzelando, kiu ĉirkaŭvojaĝas la mondon. Nia Federacio, en kunlaboro kun grava societo «Montepío de la Dependencia Mercantil», aranĝis prelegon, kiu estis la unua en la ciklo de kulturaj prelegoj de tiu klera societo. S-ino de Cleene gajnis tuj la simpation de la multenombra ĉeestantaro, rakontante vigle kaj elokvente siajn impresojn pri longa vojaĝo de Novzelando al la nordo de Afriko kaj Eŭropo, eĉ al Islando; kaj, post unu jaro da senĉesa vagado, ŝi vizitis Germanion, partoprenante la Kongreson en Munkeno, kie ŝi denove havis okazon konstati la taŭgecon de Esperanto kiel internacia lingvo. Ŝi multe laŭdis nian landon, kiu tre plaĉis al ŝi, speciale pro la ĝentileco de ties enloĝantoj. Fine, la ĉeestantoj admiris centon da lumbildoj el Novzelando, kiuj montris la belecon de ĝiaj mirindaj insuloj. D-ro Herrero majstre tradukis de Esperanto en la hispanan lingvon, kio multe helpis al la sukceso de la prelego de nia ŝatata vizitantino. La urbaj ĵurnaloj favore raportis, akcentante la utilecon de nia lingvo por la turismo kaj la internaciaj rilatoj. Sekve, la urba intereso por nia movado multe kreskis.

Ankaŭ nin plezurigis, antaŭ nelonge, la alveno de alia vigla mondvojaĝanto, S-ano Marín, kaj Ges-roj Jakobs, tre ĝentilaj gesamideanoj el la bela flandra urbo Antverpeno, kiuj intencas pasigi la vintron ĉe ni. Tiuj vizitoj duoble ĝojigas nin; ĉar, krom la plezuro, kiun ni spertas pro la persona konatiĝo kun samcelanoj, ni havas okazon propagandi por nia afero per la plej konvinkiga maniero: flue kaj senpere interparoli, kaj eĉ tre amike babili, kun eksterlandanoj tute ne sciantaj la nacian lingvon.

JAIME JUAN FORNÉ

# XIII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO EN VALENCIA

**29-30-31 de Julio y 1 de Agosto de 1952**

Bajo la presidencia del prestigioso y consecuente esperantista valenciano D. Luis Pérez Requena, se ha constituído el Comité Organizador de nuestro próximo Congreso. Este Comité, integrado por un nutrido grupo de entusiastas amigos, ha iniciado ya sus tareas con gran entusiasmo, en su deseo de que el magno Certamen del esperantismo español, en la misma ciudad donde reside el supremo organismo nacional, deje una grata memoria a todos los asistentes. Se prepara un magnífico programa donde el trabajo positivo y eficiente se verá completado con un variado conjunto de excursiones, recreos y distracciones, que tendrán como fondo la deslumbrante policromía de la famosa Feria de Julio en Valencia, con su maravillosa Batalla de Flores. Podemos anticipar ya que la cuota será de 30 pesetas para los congresistas efectivos y 20 pesetas para los familiares acompañantes. Van a imprimirse los boletines de adhesión y material informativo, con los datos necesarios para facilitar un estancia confortable y económica, ya que el interés de los organizadores está inspirado en este fin, esperando verse correspondidos con una nutrida concurrencia. ¡Haced ya vuestros proyectos! Pedid informes, que se os facilitarán seguidamente, al

**COMITE ORGANIZADOR DEL XIII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO**

**PELAYO, N.° 7, 1.° .- TELEFONO 19523 - VALENCIA**

# INTERLINGVA PARALELO

**ORIGINALO**

Ĝis nun, multaj familioj, por ĝui feriojn aŭ semajnofinojn, posedis kabanon en la montaro aŭ apud la maro. Sed, la posedanto iom post iom sentis sin tro ligata al la sama loko. Tial, do, la «Ruliĝanta Hejmo», avantaĝe, povas esti starigata kie ajn.

El verketo «Tra Usono kun Ruliĝanta Hejmo» de Jozefo R. Scherer, konata esperantisto en Los Angeles (Kalifornio)

**TRADUKO**

**Hasta ahora, muchas familias, para disfrutar las vacaciones, o los fines de semana, poseían una cabaña en la montaña o junto al mar. Pero el propietario, poco a poco, se sentía demasiado ligado al mismo sitio. Así pues, la "Casa rodante" ventajosamente, puede ser montada en cualquier lugar.**

De la obrita «A través de los Estados Unidos con una Casa Rodante» por José R. Scherer conocido esperantista en Los Angeles (California)

# ESPERANTO-EKSPOZICIO EN MADRIDO

## NIA DILIGENTA MADRIDA SEKCIO KURAĜE ALPAŜIS KAJ PLENE SUKCESIS EN TIU SIA UNUA PUBLIKA ELMONTRO

Tie mem, en la geografia centro kaj ŝtata ĉefurbo, Esperanto ĵus gajnis gravan batalon, okaze de tre zorge kaj bone aranĝita ekspozicio de varia materialo, kiu dum tuta semajno —meze de pasinta Oktobro— pompis kaj rangis en ĉefa salono de la Societo «Casa de Arágón». Konsciante pri la graveco de tiu unua publika elmontro, kaj akceptante, cetere, ĝentilan inviton de la madridaj gesamideanoj, nia redaktoro, S-ro Luis Hernández, kaj la gvidanto de la instrua fako La Lernejo, S-ro Juan Bosch, veturis Madridon por kunvivi kun la tieaj geamikoj, dum kelkaj tagoj el ilia sukcesplena semajno, sub la ekstrema regalado de ilia delikata gastameco, kiu atingis la limojn de plej rafinita ĝentileco. En la vespero de la inaŭguro de la Ekspozicio, S-ro Hernández faris la malferman paroladon, antaŭ vasta ĉeestantaro; firme kaj trafe, per poluritaj frazoj li prezentis la logikajn argumentojn de nia honesta celo, kiu ŝatas nenion kaŝi, ĉar nenio kaŝinda en ĝi estas. La sekvantaj tagoj sekvis tiel sukcese, kiel la unua. Ankaŭ prelegis, tre elokvente, niaj eminentaj samideanoj, la generalo José Perogordo kaj doktoro Carlos San Antonio, pioniroj el la frua epoko de la hispana esperantismo, kies nomoj honorplene situas inter la membraro de nia Federacio. La novzelanda samideanino Patricia de Cleene pruvis, per tre oportunaj salutvortoj, la veron de ĉiuj antaŭe diritaj asertoj. Malgraŭ la fakto, ke oni ne faris bruan reklamadon, la Ekspozicio estis vizitata de miloj da personoj el ĉiuj sociaj tavoloj, kiuj ne simple aŭ supraĵe vidis la materialon, sed atente rigardis la gazetojn, admiris la kartojn, foliumis la librojn kaj serioze faris demandojn, kies klarigojn scivoleme ili aŭskultis. La blindula sekcio, zorgata de blindaj amikoj, vekis specialan atenton. Kompreneble, la filatelia angulo havis, magnetan logon por la poŝtmarkkolektantoj. Tial, ke troviĝis dika stoko da turismaj propagandiloj, oni povis donaci ilin al la vizitantoj; kelkaj el ili revenis en postaj tagoj, kun hispanlingvaj libroj el tiuj, kiuj esperantlingve situis en la Ekspozicio, por fari komparon de plej konataj fragmentoj. Por la fermo, oni aranĝis feston, en kiu kelkaj fraŭlinoj kantis kaj deklamis; fine, nia aktiva kaj senlaca delegito en Madrido, S-ro J. López Herrero, faris la resumon kaj admonis ĉiujn eklerni, lerni kaj ellerni nian lingvon, kiu jam forigis la ŝelon de suspektindeco, por gajni aŭreolon de supera prestiĝo. Kelkaj el la gravaj madridaj ĵurnaloj, kiuj estas tutlande legataj, informis kaj raportis; same kiel la Nacia Radiostacio, sekve de oportunaj intervjuoj, faritaj de diversaj ĵurnalistoj.

Al la anoncitaj kursoj aliĝis granda nombro da lernantoj, kiuj venas kun konvinko kaj garantias pozitivajn rezultatojn al la fervoro de tiuj bonaj geamikoj, kiuj nur gratulojn meritas pro la grava sukceso de la unua Esperanto-Ekspozicio en Madrido.



*Grupo de samideaninoj el Madrido, kun la plej juna tiea esperantisto, en la salono de la ekspozicio*

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FRANCIA.—Durante la Feria de Muestras de Angers estuvo abierto un stand del Grupo Esperantista local que fue muy visitado por el público a causa de sus exposiciones de filatelia y de tarjetas ilustradas, procedentes de las cinco partes del mundo.

● DINAMARCA. La Dirección de Enseñanza, de Copenhague, subvencionó con 600 coronas a la señora Roma Thorsen para realizar un viaje por Italia, a fin de capacitarse acerca de las escuelas donde se enseña el Esperanto y comprobar su eficacia didáctica.

● ITALIA.—Del 9 al 12 del pasado Septiembre, se celebró en la histórica ciudad de Pisa el XXIII Congreso Italiano de Esperanto que fué inaugurado personalmente por el Ministro de Instrucción Pública, señor Segni, que tuvo frases de elogio y de aliento para todos los esperantistas alli presentes, ente los que figuraba el propio alcalde de la ciudad.

En el Comité de Honor no faltaba tampoco una amplia representación parlamentaria.

«Ente Nazionale Turistiche» (Via Marghera, 2 - ROMA), remite gratuitamente folletos turísticos sobre Italia, escribiendo a dicha oficina directamente en Esperanto.

● PORTUGAL.—«Diario de Lisboa» del 2 y 17 de Septiembre ha publicado dos extensos artículos sobre el Esperanto, como idioma con derechos para ser el internacional.

● SUIZA.—Un bello folleto con los programas de la radioemisora de Berna se expide a quien escriba en Esperanto a la estación «Schweizer Kurzvellendienst (30, Neuengasse - BERNE).

● AUSTRIA.—El señor Franz Jonás, alcalde de Viena, es un entusiasta esperantista y en su cargo, desde Mayo último, ha recibido y atendido la visita, haciéndoles agradable la estancia, de muchos samideanos extranjeros, visitantes de la bella capital austriaca.

● CHECOESLOVAQUIA.—En este país existen organizados 94 Grupos Esperantistas locales; el de la capital, Praga, suma 404 miembros de ambos sexos y distintas profesiones.

● ESTADOS UNIDOS.—«United States Governement Printing Office Style Manual» contiene instrucciones, sobre el arte de imprimir, en los idiomas inglés y en otros 18 más, entre ellos el Esperanto. Los periódicos en alemán «Sonntagsblat Staatszeitung», «Rochester Abendpost» y «Volkszeitung Tribune» han publicado artículos sobre el Esperanto, como idioma auxiliar, con motivo del último Congreso de «Esperanto-Asocio en Nord-Ameriko».

● BRASIL.—Se prevé resulte muy brillante el 13 Congreso Brasileño de Esperanto (9 al 16 de Febrero de 1952). Hasta la fecha han aceptado asistir a las reuniones cinco Gobernadores de Estado, muchos Alcaldes de diversas ciudades y un Ministro Federal. El Congreso se ve muy favorecido con la ayuda moral y material del Gobernador del Estado de Pernambuco. El Excmo señor Presidente ha dictado un decreto autorizando la edición de un album sobre Recife; una productora de películas filmará los más interesantes actos del Congreso que serán radiados por una potente emisora. Radio Baru emite un programa en Esperanto todos los lunes de 21'45 a 22 horas. Emisora PRG 8, 1210 kc. 240 m ; ZYR 31, 3275 kc 91 m.; ZYR 34, 899 kc. 330 m. En la conocida firma de productos químico-farmacéuticos «Bayer», el 4 de Septiembre se inició un curso intensivo de la lengua auxiliar.

Está prevista una duración de tres meses para este curso. Quien desee relacionarse con estos nuevos esperantistas, puede dirigirse a: Caixa postal 560, Rio de Janeiro (Brasil).

● GUATEMALA.—La «Voz de Centro América» ha modificado el horario de sus amenas e interesantes emisiones en Esperanto. Actualmente son los martes de 22'15 a 22'30.

● AUSTRALIA.—En el Colegio Anglicano, de Adelaida, se está explicando en curso que es seguido con gran interés; como así también en el «High School», de Horsham.

## EL ESPERANTO Y LA GRAMOFONIA

«Hollandsche Decca Distributie N. V.», de Amsterdam (van Baerlestraat, 3) casa dedicada a la fabricación de discos para gramófono, impresionó en el numerado M 32.637 la composición «Esperanto-Marŝo», de Jacobo Feitsma. También por una fábrica checoslovaca han sido impresionadas en un disco tres canciones en Esperanto: «Nur Migri», de Julio Baghy; «Aŭtuno venas», de Bozena Studničková y «Melankolio», popular y delicada melodía de Karel Piĉ.

## EL ESPERANTO EN LA PRENSA

**Durante 1.950, el Esperanto ha recibido mucha atención por parte de la prensa mundial. Por ejemplo, en Alemania (zona occidental), se publicaron unos 500 artículos o noticias sobre la lengua auxiliar; en Italia, unos 200; en Noruega, 130 periódicos publicaron 700 artículos o noticias del Esperanto**

# Ricevitaj Libroj

**DICCIONARIO ESPERANTO-ESPAÑOL**
*Enrique Balech kaj Manuel Fernández Menéndez, Eldono de la Federaçao E. Brasileira, Rio de Janeiro, 1951. —122 p.—Prezo ne montrita.*

Mankas jam de longe al la hispanparolantaj popoloj taŭgaj kaj fidindaj vortaroj ĝisdataj, kiaj estis siatempe tiuj de V. Inglada Ors kaj A. López Villanueva, kiuj jam de longe elĉerpiĝis. Cetere, ili aperis antaŭ preskaŭ duonjarcento, kaj en lingvo ankoraŭ ne sepdekjara, multaj eventoj okazis dume, inter ili ĉefe la gravega leksikona laboro de la Akademio de Esperanto. En Hispanio ne mankis posteuloj de tiom gravaj pioniroj, kaj glosaroj, kiaj tiaj de Bremon, Valls, Anglada, Caplliure ktp.; ili estas multrilate laŭdindaj, plenmeritaj, kaj serioze kontribuis al antaŭeniĝo de la movado en nia lando. Sed, ververe, la truon de bona kaj fidinda **hispana**-esperanta vortaro ankoraŭ neniu sukcesis kontentige ŝtopi. Malhavo de la mala vortaro, t. e. **esperanta**-hispana, eĉ se oni ĝin tre sentas, ne estas tiom tira; ĉar, nu ja, por kompreno de Esperanto, la Plena Vortaro de SAT multe helpas. Tial, estas varme salutinda ĉiu nova serioza alporto al nia leksikologia tereno. Kaj tia —serioza kaj de nun ĉiel atentota— estas la laboro de samideanoj Balech kaj Fernández Menéndez. Temas pri esperanta-hispana vortaro (pli ĝuste, glosaro), kiu enhavas pli da glosoj, precipe teĥnikaj kaj fakaj, ol iu ajn antaŭe presita simila verko, ĉefe laŭ la modelo de la Plena Vortaro de SAT, kiun la autoroj sekvas eĉ je ties, kvankam okazaj tamen evidentaj eraroj. Plie, ne mankas en la libro eĉ ĵusbakitaj neologismoj, kiujn ankoraŭ ne registris P. V. Tiel do la verko estas rezulto de ama varto de niaj du konataj pioniroj, kaj ĝi havas multon notendan kaj valorajn kontribuojn. Ĉiu serioza studanto de nia lingvo devas nur ĝoji pro ĝia apero. Sed lingvo estas, antaŭ ĉio kaj ĉefe, **tradicio**. Kaj ĉi tiun principon la aŭtoroj ne observis konsekvence. Kompleteco ne estas manko en vortaro, des pli en nia tutmonda, ĝis nun ĉefe skriba Esperanto, kondiĉe ke ĝi unue registru ĉiujn fundamentajn kaj oficialajn vortojn, eĉ se iuj el tiuj vortoj aŭ vortformoj arĥaikiĝis.

Zamenhof ŝatis neologismojn, sed laŭ vojo de paraleligo. Tial, kiam ekzemple mankas en la recenzata verko la oficiala kaj zamenhofa **akvaforto**, la novismo **akvoforto**, kiun misenmetas la aŭtoroj, estas neniel pravigebla; kiam mankas la ankaŭ oficiala **proletario**, la neologa **proleto**, eĉ se pli vaste nun uzata, akuzas nekonsekvencon; kiam tute forestas la same oficiala (6ª aldono) **vinkto** (hispane **remache, laña**), oni nur povas ja forte riproĉi; ktp. Unue, **nepre** estu ĉiuj oficialaj vortoj; **nur** tiam povas ĉiel paradi plej ĵusaj leksikoneroj, eĉ se poste, kiel decas, la lingvo filtros ilin laŭforme kaj laŭsence.

Alia punkto diskutinda estas la listigo de kunmetaĵoj, inter kaj kvazaŭ radikvortoj, kiaj: **aldoni, altreliefo, alveni, amindumi, bontrovi, jetkubo,** ktp., kio estas elpaŝo por rigidigi nian lingvon. Tiaj kunmetoj estas ja ĉiel klarigendaj, ĉar multokaze ili rolas kvazaŭ novaj «radikoj», sed sialoke kaj ne dise kaj ĥaose. Pri alia afero mi ne estas sufiĉe kontenta: pri la hispanaj egalaĵoj de la esperantaj vortoj. **Aboco** estas **abecedario** kaj ne (=**alfabeto**); **bakalaŭro** estas **bachiller** kaj ne **licenciado** (=**licenciato**); **boardi** estas **navegar en bolina** kaj ne **bordear** (=**navigi laŭborde**); **ferio** estas **vacación** kaj ne **feriado** (=**festa**) nek **descanso** (=**ripozo**); **genisto** estas **retama** kaj ne **aulaga** (=**legumenaca planto**); **hubo** ne estas **huebra**: ĝi ne havas hispanan vortegalon kaj postulas gloson; **kliko** estas ankaŭ **pandilla**; **lektoro** estas **lector** (**universitario**) **de lenguas** kaj ne **profesor universitario** (=**universitata profesoro**); **magistro** ne havas vortegalon kaj tiel ĝi bezonas gloson, ĉar la apudigata **licenciado**, kiel dirite, estas **licenciato**; ktp. Preserarој abundas kaj ili troviĝas ekde la kovrilo, kie la konjunkcio inter la du aŭtornomoj devas esti **y** anstataŭ **e** (portugala!). La formo internacia estas jezuito; jesuito (kvankam Jezuo/Jesuo) ne estas pli bona, kaj enkondukas nur konfuzon. La hispana ortografío, koncerne supervokalajn akcentostreketojn, multe lamas.

Nur je dua aŭ tria eldono vortaro aŭtoritatas kaj vere bonas. Tial estus dezirinda baldaŭa dua eldono de ĉi tiu, malgraŭe, rekomendinda verko; ja la Antaŭparolo lojale agnoskas tiun staton kaj samideane alvokas kompletigan kaj eĉ plibonigan helpon pro tio, ke, multrilate, la verko estas pionira. Tiam la reeldonontoj devus serĉi kunlaboron de hispana spertulo, kiu aldonos pli komunajn glosojn kaj lecionojn de la klasika hispana lingvo de Eŭropo. Ameriko, kompreneble —tiel en sia latina duono, kiel en sia anglaĝermana cetero— multloke por laŭforme identa vorto, uzata en Eŭropo, havas tute alian signifon; sed estas ja ĉefe en la nuancoj, kie oni devas zorge atenti, rimarki, konstati la diverĝojn kaj agi laŭe. Kaj tiel, post kunjungo de hispano al la laboro, la verko nedubeble fariĝos pli eminenta, kaj estos elstara ekzemplo de la inter- aŭ supernacia kunlaboro, kiun Esperanto reprezentas.

Fine neniel forgesitas S-ro I. Gomes Braga, al kies helpemo kaj mentoreco, per la Federaçao E. Brasileira, ni dankas la eldonon.

**J. RÉGULO PÉREZ** (Kanariaj Insuloj)

**UN AÑO MAS SE TERMINA Y OTRO NUEVO SE APROXIMA...** *Y aunque los años acumulan desengaños también traen ilusiones, que pueden ser realidad en la medida del esfuerzo que nosotros hagamos por ellas. Uno de los deberes, en tal sentido, es prepararse para pagar la cuota de 1952, demostrando con la puntualidad en el pago la buena opinión que merece el trabajo realizado por nosotros hasta ahora. En estos días de balances e inventarios, cuando casi todas las revistas y publicaciones esperantistas del exterior elevan sus precios en más de un 50 %, nosotros podemos anunciar a todos los amigos, con satisfacción no exenta de orgullo, que las tarifas de nuestra Federación, para el próximo año,* **no sufren ningún aumento** *y siguen siendo pues las mismas, a saber:*

Socio de número 15 pesetas - Socio abonado 40 pesetas - Socio protector 75 pesetas

*Como merecida compensación, confiamos y esperamos que ningún esperantista, dentro del ámbito peninsular, permanecerá alejado de nuestra organización, que ostenta la honrosa representación del esperantismo español.*

# ☆ LA LERNEJO

**PRILINGVA RUBRIKO**

Responde al amiko Arizmendi, mi diru al li, ke se li havas la Plenan Vortaron, tute ne devas ekzisti dubo por li, rilate la signifon de «temo» kaj «temi», ĉar tio estas tute klare priskribita en tiu verko. Tio, kion vi skribas, estas tute ĝusta; sekve, la traduko en hispana lingvo ja estas: «se trata» en la frazo de vi montrita: «ne temas nun diskuti pri tio».

Pri la diferenco inter «kvankam», «malgraŭ» kaj «spite», mi nun dediĉas kelkajn vortojn al S-anino L. R. Ĉu vi facile komprenos pere de ekzemplo? Jen do: «Kvamkam vi tion ordonis al mi, mi rifuzas obei vin, malgraŭ la respekto, kiun mi ŝuldas al vi; kaj ne kredu, ke mi deziras spiti vin.» «Aunque usted me lo ordenó, me niego a obedecerle, a pesar del respeto que le debo, y no crea que es por llevarle la contraria.» Elkorajn salutojn al ambaŭ gesamideanoj!

**JUAN BOSCH**

## CONGRESOS DE ESPERANTO

*Con oportuna anticipación, se irán dando a conocer los Congresos nacionales e internacionales, que han de celebrarse durante el año 1952, a fin de que se les puedan mandar saludos*

8.ª ESPERANTO-KONGRESO DE AÚSTRALIO

**Del 31 de Diciembre 1951 al 6 de Enero 1952**

**12 Ennis Road - Milson's Point** **SYDNEY (N. S. W.) Australia**

## PARA NUESTRO BOLETIN

**(Donativos correspondientes a NOVIEMBRE 1951)**

| | | |
|---|---|---|
| **Suma anterior** | **3.276** | **Ptas.** |
| **Esperanto-Grupo de Sabadell** | **55** | » |
| **Vicente Perles (Miraflor-Vergel)** | **7** | » |
| **Jaime Folch (Sabadell)** | **5** | » |
| **Manuel Ortigosa (Zaragoza)** | **2** | » |
| **Teresa Ferré (Alcover)** | **5** | » |
| **Franco Campos (Valencia)** | **5** | » |
| **Emilio Albafat (Valencia)** | **25** | » |
| **Juan Devís (Valencia)** | **10** | » |
| **Justo Están (Granada)** | **25** | » |
| **Total** | **3.395** | » |

**Solo falta una lista hasta la liquidación de fin de año. ¡A ver si redondeamos una bonita cifra!**


**ĈU VI SCIAS, KE**

# HEROLDO DE ESPERANTO

estas la sola duonmonata gazeto en nia lingvo? Cetere, ĝi aperas en granda formato!

TARIFO POR NIA LANDO

**Tuta jaro: 80 pesetoj** (en unu sola fojo) - **1.ª duonjaro: 50 pesetoj** - **2.ª duonjaro 40 pesetoj**

Skribu al la delegito: S-RO DELFI DALMAU

*Strato Lauria, 98* *BARCELONO*


## ANONCETOJ

**Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.**


Granda nombro da gelernantoj deziras korespondi kun eksterlandaj gesamideanoj. Respondo tute certa. Skribu al: Esperanto-Fako de «Lingua Club» Manresa (Barcelono).


## RADIO ROMA

**KUN TRE INTERESAJ DISSENDOJ EN ESPERANTO**

*Aŭskultu ilin kaj diru vian opinion al*

**RADIO ROMA** - **Esperanto-Fako - Via Veneto, 56, Roma (Italio)**

Ondoj: 25,40 mt. = 11.810 kc/s.
31,35 » = 9.575 »
49,92 » = 6.010 »
Tagoj: Merkrede kaj vendrede
Horo: De 18,30 ĝis 18'50

*NOTO.—En la hortabelo de nia pasinta numero estis eraro, kiun oni devas korekti laŭ la supra indiko.*

## IMPORTANTE

*Todavía tenemos existencias de los dos interesantísimos opúsculos del*

Profesor **Manuel Fernández Menéndez:**

**El Esperanto en la opinión de hombres eminentes y algunos hechos**

**(2.ª edición, muy aumentada). Un folleto con nutrido material, de gran eficacia para la propaganda . . . . . . . . 5 ptas.**

**Valor educativo del Esperanto**

**Notable estudio de 40 págs. (24 x 16), ilustrado con 10 fotograbados . . . . 5 ptas.**

*Apresuraos a hacer vuestros pedidos a*

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

RUZAFA, 7 VALENCIA

Cantos Hnos., Impr.-Valencia - Tel. 30444